


# PONTO ☆

*Jaro 5 N-ro 1 (26) Organo de Sunda Esperanto Agado jan. 2006*

## Aliĝu al la kongreso!
## Anmäl dig till kongressen!

**Aldonite al ĉi-tiu numero vi trovos aliĝilon por la kongreso. Atentu ke estos pli malmultekoste aliĝi antaŭ la 31/3! Danoj aliĝas al DEA.**

### Interesa programo

Ni invitis ege interesajn prelegantojn por la 100-jara jubileo.
La festparoladon faros Seán Ó Riain, ambadadoro de Irlando en Bruselo kaj prezidanto de Europa Esperanto Unio.
Konata por la sveda movado estas Georgo Handzlik, kies edzino Margareta estas parlamentano de EU.
Ege interesa preleganto ankaŭ estos Povilas Jegorovas, kiu organizis la Universalan Kongreson en Vilniuso pasintjare.
Ĉiuj tri parolos pri lingvaj demandoj en Europa Unio.

**KONGRESEJO**




## 25-28/5 2006
### en la Popolaltlernejo Kvarnby

Pri tranoktado, programo, mango ktp bonvolu rigardi

## www.agado.net

**eller kontakta Karin Lindquist 040-980120**

### *La perdita generacio* kaj *Georgo Handzlik* koncertos!

Por reklami la kongreson ni invitos la Malmöanojn partopreni la interkonan vesperon, la koncertojn, dancokursetojn kaj la diservon.

### Bonvenon al SEA-kunveno!

Sabate 11/3 la SEA-kunveno okazos ĉe Kim J.Henriksen, Hallandsgade 6, 4 ,2300 København Ĉe la 11.00a h. ĝis 15.00a h.
Tagordo

1. Elekto de gvidanto kaj protokolanto
2. La 100-jara jubileo
3. Raportoj pri la pasinta periodo (hejmpaĝo, kursoj, aranĝoj)
4. PONTO
5. Laborplano en la kluboj por la venonta periodo
6. Diskuto pri kursoj kaj aranĝoj
7. Ekstera informado
8. Daŭrigo de la serio ekskurso kun prelego
9. Ceteraj demandoj
10. Venonta SEA-kunsido

Bonvolu anonci vin al kek@esperanto.dk
telefone +45 32 54 93 54

Nästa **Ponto**, nr 2
utkommer ca 8/4
Skicka allt material till *Karin Lindquist*
**senast den 25.3**

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado)



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 77 N-ro 1 (695)* **>>ĉiam antaŭen<<**

Fondita en 1906


***Britt Hernsell***
membro de nia klubo ekde la jaro 1971 mortis la 5-an de decembro 2005. Ni kondolencas ŝiajn gepatrojn Ingeborg kaj Herbert.



## Lars Forsman venos al Malmö

La 25-26 de aprilo la konata informanto pri Esperanto venos por prelegi en la ĉefa biblioteko 25/4 kaj por lernejoj 26/5.
Venigu interesatojn — Lars tre kompetente prezentas Esperanton!
Pli da informoj venontnumere.

## Vojaĝo al Kirgizio 18.1

Al por ni nekonata lando Kirgizio gvidis nin Daniel Granello.
Kirgizio estas ege montara kaj riĉa je naturbelaĵoj, kion ni spertis vidante la bildojn.



Daniel kiu parolas la rusan ricevis kirgiziajn geamikojn dum la vojaĝo kaj planas reiri por spekti la printempan flaŭron.

## Viva gazeto 1.2

Per-Olov Johansson gvidis nin en la mondon de Mozart aŭdigante al ni peceton de lia muziko. Poste Asta Schaedel verŝis el siaj multaj travivaĵoj dum sia ĵus finita vojaĝo al Japanio. Ŝiaj kontaktoj kun esperantistoj tie estas imponaj. Ni aŭdos plu alian fojon!
La fino de la vespero estis tiu de Mozart pere de Per-Olov.

## Jarkunsido 15.03-06

**Tagordo**

1. Elekto de prezidanto por la jarkunsido
2. Aprobo de la tagordo
3. Ĝustigo de listo de elektantoj
4. Demando pri laŭstatuta anonco de la jarkunsido
5. Elekto de protokolkontrolanto
6. Jarraporto de la estraro
7. Raporto de la revizoroj
8. Demando pri malŝarĝo por la estraro
9. Elekto de prezidanto por la jaro 2006
10. Elekto de 2 estraranoj
    kaj 1 anstataŭanto por du jaroj
11. Elekto de 2 revizoroj kaj 2 anstatauantoj
    por unu jaro
12. Elekto de studkomitato kaj studsekretario
13. Elekto de informa komitato kaj
    informsekretario
14. Elekto de programkomitato kaj
    programsekretario
15. Elektoj de diversaj funkciuloj
16. Elekto de elektoprepara komitato
17. Decido pri vojaĝkontribuo al la jarkunsidoj
    de Sveda Esperanto-Federacio kaj
    Eldona Societo de Esperanto
    por oficialaj reprezentantoj
18. Elekto de reprezentantoj de KEM
    por la supre nomitaj jarkunsidoj
19. Eventualaj proponoj por la jarkunsido de SEF
20. Diversaj raportoj
21. Ceteraj elektoj kaj demandoj

## TAGORDO 26.4

1. Elekto de protokolkontrolanto
2. Diskuto kaj decido pri aŭtunaj kursoj
3. Diskuto kaj decido pri aŭtunaj programeroj
4. Eventualaj demandoj


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


## 100-jara Historio de Klubo Esperantista de Malmö

La kongresa komitato de kelka tempo laboras por eldoni kajeron pri la kluba historio. Se vi havas interesan foton aŭ okazintaĵon bonvolu kontakti nin!

Karin Lindquist

# Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K*
*Konversacia Esperantista Klubo*
***Kopenhago***
**N-ro 1 (665) 2006 70a-jaro**



## Nia ĝeneralkunveno okazos en la klubo 20/2 2006 je 20a h. La *tagordo* estas en la antaŭa PONTO.

**Jarraporto pri la agado de KEK 2005**
La membronombro estas 67, kiu dividiĝas jene: 57 aktivaj, 6 familiaj, 2 pasivaj kaj 2 honoraj.- La estraro kunvenis 6 fojojn. – La dan-sveda laborgrupo kunvenis 2 fojojn: en Lund (12/3) kaj en Malmö (22/10). Nia organo *Kontaktilo* pere de PONTO aperis 5 fojojn. Ĉiulunde ni kunvenas kun DEFA. Ni interkonsentas pri la aktivecoj kaj la surloka ekonomio. La DEFA-sponsorita retkafejo pro malaktiveco ĉesis. Ni havas komunan retadreson kiun ni malfermas antaŭ ol iri al la kunvenoj: defakek@hotmail.com . – Funkciis vintra programo kun porkomencantaj kaj pordaŭrigantaj kursoj, legogrupo, studgrupo kaj grupeto, kiu i.a. tradukas kantojn. – Variajn programojn ni kune faris.

Ni klopodis kunlabori kun la **kulturgrupo**. Ŝajne ni restas, kie ni estas: Ni vizitu unu la alian unuope, kiam ni havas tempon kaj emon. Eble la tempo iĝas matura por kunlaboro.

**La blindulojn** ni helpis viziti nin. Plurfoje Lars kaj Søren venis, eĉ distris nin. Akompananton por la vojaĝo al UK membro trovis ĉe la martinusmovado.

Nun KEK ricevis agnoskon kiel **volontula popolinforma asocio**, kaj ni havas la rajton peti pri publikaj lokaloj al niaj aktivecoj.

Ni festis la honorigon de **Bodil Kühlmann** en ŝia hejmo. Ŝi volonte aŭdas pri la kluba vivo.

**Pluraj eksterlandanoj** vizitis la klubon kaj eĉ prelegis aŭ almenaŭ distris nin. – Pri la *somerekskurso*: Ni iris al Køge, kie ni vizitis la raran ekspozicion "Kjøge et-urbo", kiu daŭre progresas. Ni poste ĝuis esti en la ĝardeno de Astrid kaj Erik, kiuj gasteme servis nin. – Ni vojaĝis al Tune Landboskole por jarkunveni tie.

**Multaj partoproni an la UK** en Litovio. Jytte akompanis Søren dum la kongreso por blinduloj, kiu ankaŭ okazis en Vilnius.

**Esperanto Desperado** koncertis dum la pentekosta karnevalo. Ili estis en Christiania, 1a de majo-aranĝo kaj en pluraj aliaj lokoj por granda ne-esperantoparolanta publiko. La grupo disiĝis ĉisomere kaj nova grupo Hotel Desperado naskiĝis.

**Printempe DEJO** faris kampanjon en gimnazioj en la regiono de Kopenhago, pagita de DEA. Kim interalie helpis kontakti kaj deĵori ĉe kelkaj gimnazioj

**Infotago**, aranĝita de Kim, kiun vizitis 2 svedoj kaj 2 danoj. Kim gvidis la tagon kaj donis diversajn rimedojn kaj ideojn. La partoprenantoj bone aktiviĝis.

**La svedan jarkunvenon** en Haninge Jytte partoprenis.

**Sezonkomenco:**
De la karnevalo ekzistis flugfolioj, kiujn "kosmorama" sponsore disdonis al 70 kafejoj/kulturdomoj ktp. Ni produktis "deŝir-reklamafiŝetojn" por pendigi en supermarkedoj, kulturdomoj, lernejoj ktp.
Niaj membroj lerte pendigis ilin dise en Kopenhago.

KEK sendis 4 amaskomunikilojn la 20an de septembro
unu pri nia danlingva informgazeto pri esperanto.
unu pri nova hejmpaĝo pri danaj tradukoj de H.C. Andersen al esperanto.
unu pri la tradukoj al esperanto de la komiksoj Tinĉo kaj Gastono.
kaj unu pri la malferma tago (pro la eŭropa lingvotago...)

En **Politiken lunde 26/9** paĝo 7 supre estis 4-kolona larĝa artikolo, kiu fakte estis tre informplena kaj simpatia. Pro la artikolo kaj la Dana Televido kaj la Dana Radio telefonis.

La saman tagon je la 16a horo nia prezidantino de DEA Ileana donis intervjuon en la kanalo P3 en la landa ŝtata radio, kie ŝi interalie diris, ke en Hungario oni havas esperanton en la universitato.

En la vespera Novaĵelsendo en la Dana ŝtata Televido je la 21a horo oni fine de la elsendo vidis Kim kaj lia filo Villads en lia "libertempklubo". Tie oni vidis ilin paroli esperanton, oni demandis la aliajn infanojn, ĉu ili povis diveni kiun lingvon ĝi estis. Iu intervjuis ilin. Oni montris ion de elsendo de antaŭ 5 jaroj, kie la patrino/avino de Kim/Villads parolas.

Sed tio kio estis tre rimarkinda estis, ke kiam la studia ĵurnalistino devis fini la elsendon kaj doni la vorton al la meteorologo ŝi diras: "mi ne scias kiel nomiĝas vetera raporto en esperanto sed jen ĝi estas". kaj la meteorologino respondas "sed tiu estas facila. Tiu nomiĝas "vetera raporto" (Do la aliajn vortojn oni diris en la dana escepte de la lastaj du vortoj).
Tio ĉarmigis multajn homojn, kaj estis bona ideo de la ĵurnalistino kiu intervjuis.

Fine ni povas konstati, ke 7-8 homoj venis dum la vespero pro la artikolo en la tagĵurnalo. Ĉiuj junaj.

**La programo junior en kanalo P3** pro la televidelsendo invitis Villads en la radio, kie li interalie ludigis la kanton ”Ĉu vi pretas” el Dolcxamar.

**Weekendavisen 15/4** prezentis tutpaĝan artikolon pri esperanto en la malfruntpaĝo. Tre pozitiva.

**Jyllands Posten 17/12** faris 2 plenpaĝajn artikolojn kun bildo de Tinĵo kaj de Hotel Desperado kaj intervjuo kun Kim kaj Villads.

**Internacia Tago de Kopenhago**: kune kun etnaj grupoj, kie ni disdonis flugfoliojn al la vizitantoj.

DEA aranĝis budon dum la **Librofoiro en Forum,** multaj el la membroj de KEK deĵoris.


**Paroliga kurso** okazis en Malmö. 3 klubanoj partoprenis.

**Kulturnokto**, por la unua fojo, kun ampleksa kaj varia ekspozicio kaj filmprezentoj. Bent Jensenius, ankaŭ ano de la kulturgrupo, respondecis ĝin. Københavns Radio faris unuminutan intervjuon kun Kim pro la aranĝo.

**La artista grupo ”La Loko”** dum la tuta jaro aranĝis avangardajn projektojn. En marto ili havis sian oficejon dum 3 semajnoj en kafejo *Gefärlich*, kie ekz unu vesperon la restoracia parto prezentis ilian proponon, kiel esperanto-manĝaĵo povus esti, kaj samtempe la gastoj ricevis informon pri esperanto. Dum 5 semajnoj somere en butiko en Frederiksberg ili malfermis OVO, kie oni servis simplajn kaj bonajn pladojn, kiel ekzemple mole bolitajn ovojn. OVO ankaŭ prezentis libraron kun esperantaj libroj.
Ili faris la unuan *sit-komon* en esperanto ”Espero”. En Espero ĉefrolas kvin aktoroj, kiuj ĉiuj laboris esperante unuafoje. La aktoroj kaj la surbendigada teamo laboris en la sceno dum la ekspozicio, kiun La Loko havis ĉe Ovengaden Instituto de Nuntempa Arto en Kopenhago. La 3an de novembro estis publika prezento de la unua epizodo de Espero. La dana televido sekvis unu el la aktorinoj kaj prezentis tion la 15an de januaro 2006.

KEK starigis **novaĵleteron.** Ĝi estas rete sendita al 150 homoj.

Niajn **protokolojn** de la estrarkunvenoj ni reciproke sendas al DEA, la kluboj en Danio kaj Sunda Agado.



*Klubo Esperantista de Helsingborgo*

## Bone daŭrigu la jaro!

La festotagoj estas for kaj ni nun atendas printempon. La klubo havis sian unuan monatan renkontiĝon en la kafejo de la urba biblioteko, sabaton la 21-an de januaro je la 13.30 horo. Almenaŭ dum la nuna semestro, ni tiamaniere renkontiĝos. La datoj estos: 18/2 (jarkunveno), 18/3, 22/4 kaj 20/5. Povos esti ke ni faros ion alian, ekzemple ekskurson. Kontaktu nin por kontroli: Ann-Louise 042-29 12 62, Barbro tel. 042-12 14 71

Nia **jarkunveno** okazos sabaton la 18-an de februaro je la 13.30 horo en Café Birger en la urba biblioteko (Stadsbiblioteket). Sur la tagordo estas, kiel kutime, pritraktado de raportoj pri la pasinta jaro, elektoj kaj decido pri nia agadplano.

**Kio okazis en la klubo dum 2005?**
Nia **studrondo** laboris pri Gerda Malaperis kaj diskutis aktualaĵojn en la Esperanta mondo. Niaj monataj **klubkunvenoj** ne ĉiam okazis pro diversaj kaŭzoj. En aprilo ni anstataŭe partoprenis la printempan feston en Malmö kaj en oktobro la aŭtunan feston. En junio ni ekskursis al Sofiero. Dum la kunveno en novembro ni pakis la posedaĵojn de la klubo kaj transportis ilin al la Verdandi-domo en Ättekulla, kie ni povas uzi ĉambron kun bretaro, tablo, seĝoj kaj blanka tabulo
En decembro ni partoprenis la jubileon de la klubo en Lund kaj festis la Zamenhof-vesperon en Kopenhago. Krome, mi en majo estis en Haninge por la jarkunveno de SEF kaj en septembro mi iris al Lesjöfors por la seminario de la Sveda Esperanto-Instituto.
Do, kvankam nia membraro estas ege malgranda, io tamen okazis.

**Kaj kio okazos dum 2006?**
Bedaŭrinde nia propono pri prelego de Lars Forsman la 11-an de februaro ne estis akceptita de la biblioteko. Ĝi venis tro malfrue. Ni provos denove por la aŭtuna sezono. Kontraŭe, la prezento de la prelego de **Bertil Nilsson** (la 13.5) bele aspektas en la programo de Helsingborgs Bibliotek. Prenu mem ekzempleron kaj kontrolu!
Ni havas planojn pri aliaj prelegoj dum la aŭtuno. Se lernemuloj aperus, ni aranĝos kurson. Alie ni aktivos laŭ fortoj kaj eblecoj.

Ĝis! Ann-Louise

La Esperanto klubo de Lund

## Saluton

Grava evento en la 75-jara historio de LEK okazis la 3an de decembro, kiam renkontiĝis pli ol 30 festantoj. Kulminoj estis orgena koncerto en la Katedralo kaj koncerteto kun Tobias Lund.
Denove Ebba kaj My ludis fluton kaj pianon.

Kronikon pri LEK ni prezentis svede kaj esperante; Allan filmis, Ulla kun forta apogo de Ebba kaj My, gvidis sukcesan aŭkcion.
Vere agrabla etoso regis – la estraro dankas al ĉiuj kiuj iel kontribuis.

En la 12a de jan. estis la unua ĉi-jara kunveno. Ĉiuj rakontis pri travivaĵo. Krome ni kune legis el la libro ”En grötvägrares memoarer” de Sven B Ek ĉapitron pri esperanto, kaj svede kaj esperante.

Ni planas denove kunaranĝon kun Lundasamlingen en aprilo aŭ majo. Temo ĝis nun ne decidita!
.
Atenton: estas proponite fari ekskurson al Helsingborg la 13an de majo, por unue aŭskulti prelegon de Bertil Nilsson kaj poste kune pikniki.

La amikoj en Montendre sendis tre interesan materialon pri sia dekjariĝo (en la klubejo).

Bonvenon al nova agadjaro!

Raportis Anna-Maria Lange



La partopreno de la 75-jara jubileo de Esperanta Klubo de Lund estis tre agrabla.
Estis muziko, aŭkcio, kaj bongustaj manĝaĵoj
Speciale interese estis la vizito en la Katedralo, tie Andreo Laskowski iniciate rakontis pri la horloĝo.
Koran Dankon
Gastoj el Malmö, Helsingborg, Södra Rörum och Broby

Je75-jara jubileo la gastoj el Malmö kaj Helsingb

# SEA-kunsido en Malmö

## La 9-a SEA-kunveno okazis la 22.10.2005 en Malmö.

Ĉeestis: Karin Lindquist kaj Sten Svenonius el Malmö, Jytte Sunekaer kaj Kim Henriksen el Kopenhago, Anna-Maria Lange el Lund kaj Jill Hilford el Helsingborg.

**1. Elektoj**
Sten estis elektita gvidi la kunvenon kaj Jill skribi la protokolon.

## 2. Raportoj pri la pasinta periodo:

**Hejmpaĝo:** Sten substrekis la gravecon de la hejmpaĝo kiel informilo por la kluboj en SEA (koncerne kursoj, programo kaj la jubilea kongreso en Malmö 2006). Ĝis nun nur li kaj Karin povas ŝanĝi la informojn, kiuj sekve ne ĉiam estis tute aktualaj. Pro tio Sten proponis, ke unu el ĉiu klubo de SEA havu la rajton eniri la hejmpaĝon kaj ŝanĝi, enmeti kaj elmeti informojn. Estis decidita, ke ili kunvenu la 12.11.2005 je la 17-a h. en Malmö tuj post la paroliga studtago por eta kurso. Sten informis nin, ke Ileana faros facile legeblan ligilon de la fronta paĝo de la hejmpaĝo de DEA al agado.net.

**Kursoj:** Kim raportis pri 3 kursoj (por komencantoj kun 8-10, por daŭrigantoj kun 5-7, kaj por progresantoj kun kelkaj partoprenantoj), Anna-Maria pri komencanta kurso en Lund kun 2 kaj Jill pri konvercia studrondo en Helsingborg kun 2-3 partoprenantoj.

**Esperantoaranĝoj:** Dum la pasinta periodo estis abunda programo de esperantoaranĝoj (legebla en agado.net).

## Planoj de la kluboj:

**Kopenhago:** Kim informis, ke Ileana planas intensivan komencantan kurson la 20.1.-3.2.2006, kaj ke eble paralele okazos progresanta kurso. Dum la semajnfino la 4.2.-5.2.2006 estas ankaŭ planita kurso por instruistoj. Kim ankaŭ informis, ke esperanto presentiĝos dum librofoiro en Kopenhago la 20.11.2005, ke estos esperanta budo en la internacia tago en Nørrebro, ke estis aranĝo dum la kulturnokto en Kopenhago, afiŝo en la strato ”Internacia Kulturlingvo”, kaj ke Hotelo Desperado kantos fine de oktobro.

**Lund:** Anna-Maria raportis pri la planita ĉeesto de LEK en la UNO-tago en Lund la 24.11.2005 kun ebleco presenti esperanton, pri la planita 75-jara jubilea festo en Lund la 3.12.2005 je la 10-a horo antaŭ la katedralo kaj pri la eblecosciigi pri esperonto dufojojn jare en Lund.

**Malmö:** Sten raportis detale pri la planoj por la 100-jara jubilea kongreso la 25.5.-28.5.2006 en Malmö kaj pri la celo vere ĝoigi la partoprenontojn. Eble Werner Bormann ne venos pro pli malbona sanstato kaj tiaokaze la redaktoro de la Ondo anstataŭos lin. Anna-Maria parolis pri la Perdita Generacio, gejunula muzikgrupo, kaj ŝi prenos kontakton kun ĝi. La ebleco serĉi monon de SEF por muziko kaj informado en la urbo (pere de la Perdita Generacio) por interesigi gejunulojn estis diskutita, ankaŭ la kunlaboro de la grupo en la radio kaj televideo. Kim proponis sian helpon fari alternativan programon por infanoj/gejunuloj.

**Helsingborg:** Jill raportis, ke serio de prelegoj en la urba biblioteko estas planita en la printempo kun ekzemple Anna-Maria Lange, Lars Forsman, Agneta Emanuelsson kaj Kerstin Rohdin, kun mona apogo de la studorganizo ABF. Sten proponis ke la prelegantoj ankaŭ prelegu en Malmö antaŭ aŭ post la aranĝoj en Helsingborg.

**3. Vidpunktoj de Ponto**
Karin admonis, ke la kluboj sendu informojn al ŝi.

**4. Laborplanoj en la kluboj por la venonta periodo**
Krom la jam menciitaj planoj en punkto 2., Anna-Maria informis, ke eta A6-folio kun mallonga informo estas planita en Lund, ”Språket som förenar”.

**5. Diskutoj pri kursoj kaj aranĝoj**
Krom la jam menciitaj kursoj kaj aranĝoj en punkto 2, nenio estis diskutita.

**6. Ekstera informado**
Sten informis pri planita vizito de oficistino de ”Malmö Turism” por poste skribi pri la jubilea kongreso en la hejmpaĝo de Malmö.

**7. Daŭrigo de la serio ekskurso kun prelego**
Anna-Maria informis pri ekskurso en la katedralo kaj urbo dum la jubilea festo en Lund.
Jill informis, ke eble la serio ekskurso kun prelego daŭrigos en Helsingborg.

**8. Ceteraj demandoj**
Ne estis ceteraj demandoj.

**9. Venonta SEA-kunsido**
**La venonta kunsido okazos la 11-3 2006 en Kopenhago.**

| Kiam/När? | Kie/Var? | Kio/Vad? |
|---|---|---|
| 2006-02-08 | KEKG, Kopenhago | \"Vegetarismo kaj sana nutraĵo\". Prelego de Helen Claesson kun praktikaj demonstracioj. |
| 2006-02-09 | LEK, Lund | Prezento de propraj tekstoj pri afrikaj kaj svedaj famuloj |
| 2006-02-13 | KEK,/DEFA Kopenhago | Kursoj kaj studgrupoj |
| 2006-02-15 | KEM, Malmo | Libroaŭkcio. Ĉi tie vi trovos multajn maloftaĵojn |
| 2006-02-16 | LEK, Lund | WANGARI MAATHEL, Kenjo (Nobel-pacpremiito 2004) JULIUS NYERERE,la noblulo de Tanzanio, DAG HAMMARSKJÖLD (parte prezentita |
| 2006-02-18 | KEH, Helsingborg | Kunveno. Ni renkontiĝos ĉirkaŭ kafeja tablo en Cafe´Birger en la urba biblioteko |
| 2006-02-20 | KEK,/DEFA Kopenhago | Kursoj |
| 2006-02-20 | KEK, Kopenhago | Generalkunveno okazos en la klubo 20/2 2006 je 20a h. La tagordo estas en la antaŭa Ponto. Jarraporto pri la agado de KEK 2005. |
| 2006-03-01 | KEM, Malmo | Kun muloj en Maroko. Agneta Lund rakontos kaj montros bildojn |
| 2006-03-06 | KEK,/DEFA Kopenhago | Kursoj: Bent Jensenius prezentos la duan parton de sia lumbildprelego: \\\"Vojaĝo en tempo kaj spaco\\\". Bent logis komence de la 70-aj jaroj dum pli ol unu jaro en Brazilo, kaj li rakontos pri siaj spertoj. |
| 2006-03-08 | KEKG, Kopenhago | \"Bosnio kaj Herzogovinio - geografio, historio kaj kulturo\" Prelego de Amir Hadziahmetovic |
| 2006-03-13 | KEK. | Kursoj kaj studgrupoj |
| 2006-03-15 | KEM, Malmo | Jarkunsido. Tagordo paĝo 2 en Ponto nr 1-06 |
| 2006-03-16 | LEK, Lund | JARKUNVENO |
| 2006-03-18 | KEH, | Kunveno. Ni renkontiĝos ĉirkaŭ kafeja tablo en Cafe´Birger en la urba biblioteko |
| 2006-03-20 | KEK,/DEFA | Ana Rossum rakontos pri Esperanto-Domo. DEFA Kopenhaga membro kunveno |
| 2006-03-27 | KEK,/DEFA Kopenhago | Egon Starup-Jensen: Matematiko II. Se vi partoprenis 2/1, kiam Egon prezentis la unuan parton, certe vi kun ĝojo atendas la duan parton. Ankaŭ aliaj estas bonvenaj! |
| 2006-03-29 | KEM, Malmö | Ni ekzercos nin en Esperanto antaŭ la jubileoj kaj kongresoj |
| 2006-04-03 | KEK,/DEFA Kopenhago | Birthe Lapenna rakontos: La esperanto-vivo en Danio ĉirkaŭ la jaro 1962, kiam okazis la UK en Kopenhago |
| 2006-04-04 | KEKG, Kopenhago | \"Poŝtmarkoj rakontas\" Reĝo Harald decidas kristaniĝi post t.n. Dio-juĝo. Zeŭo ĵetas Kalistoan kaj Arkason ĉielen Toro rajdas en la aero kaj decidas pri fulmo kaj tondro, pri ŝtormo kaj pluvo, pri la vetero kaj la rikoltaĵo. Al la rerakontado de tiuj historioj - kaj multaj aliaj - Mogens Rude Andersen trovis dum sia 50-jara Esperanta korespondado inspiron de diversaj poŝtmarkoj danaj kaj eksterlandaj. |
| 2006-04-12 | KEM, Malmo | ANNA-MARIA LANGE denove gvidos ekskurseton en la gramatikon: de transitivaj verboj al akuzativo |

**Rigardu www.agado.net por pli da programoj!**

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h.
en la ejo de nia studorganizo SENSUS,
Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en
.Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund
tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe
Barbro Haraldsson tel. 042-121471

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn tie. Prezidanto: Kim J. Henriksen, tel. 0045-32 54 93 54. Rete: kek@esperanto.dk

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset,
Danasvej 30 B, atingebla per
buslinio 29 el stacio
Vesterport,salono n-ro 1,
dua etaĝo. Pordoj malfermitaj 19.00-23.00.
Ĉiu prelego okazos ĉ . 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al
Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
Persone al la kontaktulo de KEKG:
Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk
Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en
Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krd)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@kabelmail.dk

## Programo Vasbygade (DEFA/KEK)

La du kluboj (KEK kaj DEFA Kopenhago) havas la retadreson *defakek@hotmail.com* kiun ni malfermas antaŭ ol iri al la kunvenoj

Rakontu pri tiu adreso al viaj amikoj. Ni esperas, ke tio faciligos kontakton inter la kopenhagaj esperantistoj kaj la tuta mondo.

La unuan lundon de la monato ni kune vespermanĝas 18.30 - kunportu mem viajn buterpanojn aŭ mendu ĉe Ruth, tel. 36 46 62 79, plej malfrue la vendredon antaŭe.

Pri kursoj - jen nia oferto printempe 2006:
Kursdatoj: 16/1, 23/1, 30/1, 6/2, 13/2, 20/2, 27/2, 6/3, 13/3
Studgrupaj datoj: 23/1, 30/1, 13/2, 27/2, 13/3
Kursoj:
Kurso por komencantoj ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45
Kurso por daŭrigantoj ĉiulunde 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45

Instruantoj: Regin Larsen, Zita Garbaraviciené, Kim Henriksen

Legogrupo:
Arne Casper estras legogrupon ĉiulunde 19.00-19.30 kaj 20.00-20.45

La kondiĉo por partopreni kurson aŭ legogrupon estas membreco de unu el tiuj kluboj: KEK, DEFA Kopenhago, DEJO. Parolu kun la du kasistoj, Karen Olsen (DEFA) kaj Egon Starup-Jensen (KEK).

Studgrupoj:
1: Ni daŭrigas la laboron pri la libro de Kolker: 'Vojaĝo en Esperanto-lando' -voĉlegado, tradukado (se necese), diskutado, lingvaj interesaĵoj. Post finlegado la grupo diskutas kiel daŭrigi.
2: 'La iama HCA-teamo' daŭrigas la kunlaboron, ni okupiĝu pri kant-tradukado k.s.
Gvidantoj Bent W kaj Lene.